



Forpasis Vida Jerman

La kroata aktorino kaj esperantistino Vida Jerman mortis en la aĝo de 72 jaroj, post malsano mallonga, la 10-an de decembro 2011 en Zagreb. Ŝi jam estis siaspeca „institucio“ en la kroata teatra kaj filma arto, kiam aktoro Mladen Šerment malkovrigis al ŝi Esperanton kaj enkondukis la faman aktorinon al la Studenta Esperanto-Klubo. Tie ŝi komencis aktori en Esperanto en 1973, premiere aperis dum la Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo, kaj ne finis la aktoradon ĝis la morto.

(www.liberafolio.org)

Kiel verki por la gazetaro?

En la Kleriga Lundo de la Kopenhaga Universala Kongreso Paul Gubbins, la ĉefredaktoro de *Monato*, donis lecionon pri la arto verki gazet-artikolon. Temis pri interaga leciono, ĉar anstataŭ prelegi Gubbins diskutigis la aŭskultantojn, por ke ili mem malkovru la trajtojn de bona artikolo. La programero estis filmata por la Reta Kinejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA): <http://vimeo.com/album/1743043>

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Aŭdebla Biblio en Esperanto

Ekde 2011 Ken Caviness („Keneto“), Usono, laŭtlegas la biblion en Esperanto. Nun jam 13 personoj kontribuas al la projekto. Ĉiu legas laŭ sia disponebla tempo: <http://audioboo.fm/keneto>

(Yahoo-grupo de IKUE)

UEA kun pli da membroj ol lastjare kaj 2500 amikoj en Facebook

UEA notis du gravajn statistikajn rezultojn en novembro 2011: la nombro de individuaj membroj superis la

pasintjaran nombron kaj la nombro de la ŝatantoj de la paĝo de UEA en Facebook atingis 2500. La definitiva statistiko aperos en la aprila numero de la revuo *Esperanto*. La paĝo de UEA en Facebook estas kreita en 2009. Du jarojn poste ĝi ricevis sian 2500-an „ŝatanton“. Plej multe da ŝatantoj estas en Usono (282), Brazilo (213), Francio (155), Hispanio (122), Italio (119), Pollando (117), Germanio (98), Meksiko (82), Argentino (75) kaj Rusio (61). Laŭ la aĝo la ŝatantoj distribuiĝas jene: ĝis 17-jaraj 2,5%, 18-24-jaraj 14,2%, 25-34-jaraj 22,4%, 35-44-jaraj 17,2%, 45-54-jaraj 18,9%, minimume 55-jaraj 19,8% (5% ne anoncas aĝon).

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

La 5a Jarkunveno de Ĉinaj Esperanto-komercistoj

Oktobre 2011 okazis la 5a Jarkunveno de la Ĉina sekcio de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) en la urbo Hangzhou, ĉefurbo de la provinco Zhejiang. Ĉeestis 42 personoj, el kiuj estas 26 oficialaj delegitoj, inter ili ankaŭ de eksterlandaj firmaoj, ekzemple Da Vinci (Brazilo), Suministros Agroindustriales Franquesa S.A. (Hispanujo), Magenta (Irano, filio en Shanghai) kaj Mondo del Vino (Italujo). Laŭ la jarraporto de Ĉielismo Wang Ĉinaj Esperanto-komercistoj gajnis novajn sukcesojn kaj progresojn en la pasinta tempo, ekz. la importa-eksporta firmao Da Vinci en Xi'an kunlaboras kun la firmao Da Vinci en Brazilo kaj eksportas averaĝe 20 kontenerojn ĉiumonate. La negoco komunike okazas per Esperanto. Ankaŭ la firmao Xiamen Chine regule importas Italajn vinojn pere de Esperanto, eĉ importas specialan markon „Saluton“, kiun oni trinkis ankaŭ dum la jarkunveno ĉe la tablomanĝo. S-ro Aldreno Speck venis de la Brazila firmao Da Vinci kaj laboras jam du jarojn per Esperanto kun s-ro Ĉielismo. Antaŭ du jaroj li ne povis imagi la hodiaŭan fakton, ke li vivas kaj laboras per Esperanto en Ĉinio.

S-ro Wang informis, ke por la venonta jarkunveno 200 studentoj de Changsha Profesia Komerca-Turisma Altlernejo lernas Esperanton.

(Ĉielismo Wang)

Kiu vere parolas Esperanton?

Junaj Esperantistoj el Chengdu, Ĉinio, lanĉis novan retan projekton rilate al la demando „Kiu vere parolas Esperante?“ En la retejo videblas fotoj de Esperanto-parolantoj portantaj ŝildon kun mallonga mempriskribo kaj la frazo, ke li aŭ ŝi parolas la Internacian Lingvon. La ĉarma fotaro estas videbla ĉe Twitter (<http://twitter.com/miparolasesp>) aŭ ĉe <http://miparolasesperante.tumblr.com>.

(miparolasesperante@gmail.com)

Esperanto ĉe la unua tut- Afrika kongreso pri kulturo

Nome de la Afrika Komisiono de UEA, Adje Adjevi partoprenis la unuan tut-African kongreson pri kulturo. La kongreson organizis sub la aŭspicioj de la togolanda registaro Afrika Reto de Kultur-Iniciatintoj kaj Entreprenistoj (RAPEC) kun la temo: „Kulturo, ilo por evoluo en Afriko“. Adjevi prezentis Esperanton kiel eblan kontaktlingvon inter afrikanoj, kaj inter Afriko kaj la cetera mondo. Kun helpo de Kouevigan Koffi – eksa sekretario de la landa asocio en Togolando – li disdonis centojn da varbiloj al la kongresantoj.

(Adje Adjevi;

Yahoo-grupo Esper-inform)

Jakvo Schram ne plu prezidanto de SAT

Jakvo Schram, la prezidanto de la plenum-komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda, demisiis de sia posteno kaj poste komplete forlasis la asocion. Grava kialo por la ekzito estis, ke li estis elfermita el la diskutejoj de SAT. Provizore la asocion nun estras la vicprezidanto Guy Cavalier.

(www.liberafolio.org)

Dennis Keefe elektita Esperantisto de la jaro 2011

La gazeto *La Ondo de Esperanto* post voĉdonado inter 15 elektantoj deklaris Dennis Keefe la Esperantisto de la jaro 2011. La gazeto iniciatis en 1998 proklamon de la Esperantisto de la Jaro. La unua elektito en 1998 iĝis William Auld. Keefe, 60-jara usona instruisto, nun en la universitato en Nankino (Ĉinio), internacie konata iniciatinto de Lingvaj Festivaloj, estas proklamita pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj pro la evoluigo de la projekto „Esperanto-Insulo“ en Hajnano.

(www.esperanto.org/Ondo;
www.liberafolio.org)

La Esperanta gazetejo

Gazetejo.org kunigas informojn pri Esperanto-gazetoj. Ĝi ebligas al uzantoj ĝui plej diversajn gazetojn kaj estas ankaŭ ilo por gazet-redaktistoj kaj verkistoj, reklami pri siaj gazetoj kaj profitigi sian gravan kaj laŭdendan laboron al la tuta Esperantistaro:

<http://gazetejo.org>

Malferma Tago: omaĝo al Tibor Sekelj

La 35-a Malferma Tago de la Centra Oficejo (CO) en novembro allogis 70 vizitantojn el 11 landoj. La ĉefan prelegon faris Spomenka Štimec pri la vivo de la mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto Tibor Sekelj. La 14-an de februaro pasas 100 jaroj de post lia naskiĝo, pro kio Eŭropa Esperanto-Unio deklaris la jaron 2012 Jaro de Tibor Sekelj kaj ankaŭ la Komitato de UEA rekomendis priatenti la datrevenon. En sia alia kontribuo al la programo s-ino Štimec parolis pri sia verkista agado. D-ro Ziko van Dijk, prezidanto de Wikimedia Nederland, parolis pri la libera reta enciklopedio Vikipedio. Krome okazis seminario „Libera scio: kulturo de disdonado“ gvidata de Ziko van Dijk kaj Marek Blahuš. La sekva Malferma Tago okazos sabaton, la 28-

an de aprilo 2012, kaj estos dediĉita al la 50-jara funkciado de la CO en la domo ĉe Nieuwe Binnenweg.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Eventoplana jaro por ESF

En sia sciigo pri la jaro 2011 Esperantic Studies Foundation (ESF) raportis, ke Lernu.net trapasis la sojlon de 100.000 registritaj uzantoj. Edukado.net – nun festanta sian dekjarigon – reatingis la nivelon de 2000 kunlaborantoj kaj ke la dokumenta filmo *The Universal Language*, realigita, interalie, per subvencio (kaj konsiloj) de ESF, ekturteis en kinofestivaloj tra la mondo. ESF fieras, ke per tiaj projektoj – elektitaj el multaj – ili sukcesas, pozitive influi la publikan bildon pri Esperanto kaj ĝian lernadon kaj uzadon, ne nur en Norda Ameriko, sed ankaŭ en dekoj kaj dekoj da landoj tutmonde. Ili vidas en lernu! kaj la aliaj retaj projektoj la embrion de novspeca Esperant-lingva komunumo, pli oportuna kaj multflanka ol la ĝisnunaj retejoj. Fine ESF atentigas pri la ebloj, subteni la laboron, ekz. per la nuna kampanjo „100.000 eŭroj por ESF“ (<http://kampanjo.ikso.net/>).

(Mark Fettes, www.esperantic.org)

Pli videbla rolo por UEA en la terminologia mondo

Kelkajn monatojn post sia elekto kiel komisiito por rilatoj kun la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO) kaj kun Infoterm, Mélanie Maradan povis raporti al la estraro de UEA pri pluraj atingoj: UEA kaj Infoterm subskribis interkonsenton pri kunagado. Infoterm estas malpli longa nomo de la Internacia Informejo por Terminologio, kiun Unesco fondis en 1971 por subteni kaj kunordigi internacian kunlaboron en la kampo de terminologio. Infoterm proponis al UEA, traduki la dokumenton „Gvidlinioj pri terminologiaj politikoj“ por apero en la retejo de Unesco. Infoterm atentigis UEA, ke la Eŭropa Patent-Oficejo kaj Google faris interkonsenton pri maŝina tradukado

de patentaj enhavo al diversaj lingvoj. Infoterm sugestis al UEA, provi kontakti Google cele al kunlaboro en tiu projekto, se kompetenta Esperanta lingvisto estos disponebla. Terminologia Esperanto-Centro de UEA: esperanto.net/tec

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

UEA kaj TEJO kontribuis al Rio+20

Neregistaraj organizaĵoj (NRO) havos gravan rolon en Rio+20, la konferenco pri daŭripova evoluo, kiun Unuiĝintaj Nacioj okazigos en Rio de Ĵanejro en junio 2012. Kiel reprezentantoj de la civila socio, NRO-j estis petitaj kontribui per proponoj al la deklaro aprobo de la konferenco. Tiu dokumento fariĝos referenco por decidoj de ŝtataj registaroj cele al la certigo de daŭripoveco de la evoluo tutmonda. UEA kaj ĝia junulara sekcio TEJO estas aktivaj sur la „vojo al Rio“. Agema teamo en Interreto redaktis la komunan proponon kaj konsistas ĉefe el la TEJO-aktivuloj Veronika Poór kaj Nico Huurman, la loka kunordiganto de la partopreno de UEA en Rio+20, nome Ursula Grattapaglia, kaj la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj, Stefano Keller.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Laborgrupo por la Jubileo 125

La Estraro de UEA nomumis „Laborgrupon por la 125-a jubileo de Esperanto“, kiu kunplektu kunlaborantojn. Kiel ĝia kunordiganto estas elektita la antaŭa UEA-prezidanto prof. d-ro Renato Corsetti. Pri la speciala agado „Kurso 125“ respondecas en la laborgrupo Stefan MacGill, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La preparojn por la informa agado speciale lige al la Esperanto-tago en 2012, la 26-a de julio, gvidos la brita informaktivulo Brian Barker. La jubilean agadon en Afriko kunordigos Adĵe Adĵevi el Togolando kaj tiun en Azio Lee Jung-kee el Korea Respubliko

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher